Granda malfruiĝo kaj bezono de reformoj

Daŭris longe ĝis venis la nova eldono. Fakte pli longe ol logike. La unua numero de la jaro 2015 aperas en sepbembro. Kial? Nu, en 2014 ni havis du eldonojn. Ni volis havi trian por ke ne estu nur du numeroj en la papera eldono, kiun ni ĉi-jare denove volis prezenti dum Universala Kongreso en Lillo. Sed kial ne estis la tria eldono jam antaŭe? Simpla respondo: mankis artikoloj, poste mankis tempo kaj fine pro akcidento de la redkatisto ĉio prokrastiĝis.

Sed fino pri la plendado, kion ni renkontos en la nuna eldono? Denove estas artikoloj de niaj plej fidelaj aŭtoroj Anthony Lucas kaj Hiroshi Nagata. Anthony Lucas ĉi-foje klarigas, kiel per musa modelo kompreni pulmkanceron. Hiroshi Nagata verkis pri sia speciala temo "Ĉomskiismo".

Esperplena artikolo venas de Veronika Poor pri proteinadsorbado. Ĉu tiu estas la unua artikolo venante de granda serio de la SFA, la komitato pri scienca kaj faka agado de TEJO? Certe venos pliaj de nova grupo de junaj sciencistoj, kiuj volas verki pri sia fako en Esperanto.

Dum UK 2015 en Lillo la teamo de ISAE decidis ŝanĝi la organizon por ke ĝi fariĝu pli instiga al kunlaboro kaj kontribuo de junaj sciencistoj. Legu pli pri tio en tiu ĉi eldono.

Bonan legadon.

Ludwigsburg, septembro 2015

Johannes Mueller